# DIA REGNO

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (901) • 2013 •



Pavel P. kun ĉiĉerono



É. Farkas-Tatár kaj André



La paro Pospišil

## Svitavy 2013




Florbukedo sur la tombon de Karolo Pič



Eksterajo de la Eo-muzeo

**KELI**

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 311 241 406;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; 281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Ora et labora | 75 |
| KELI-kongreso 2013 | 76 |
| Jogo dum la kongreso | 80 |
| Inkunabloj ĉe IEI, parto 3 | 81 |
| La ges-roj Wurmbrand, modernaj geherooj de la Fido | 82 |
| Prediko en Svitavy, 9an de aŭgusto 2013 | 86 |
| La bizanca Atlantido | 89 |
| La remonstrantoj | 90 |
| Brönnestad – somera vojkirko | 92 |
| Informetoj | 94 |
| Vojon ekiru – La Mondkaravano | 96 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

La aŭtuno jam ĉirkaŭas nin, la unua nokta frosto igis nin varme vesti, kaj forigi la glacion de la aŭto. Nia filo komencis la unuan lernejan jaron kaj preskaŭ tuj li rompis sian dekstran brakon falinte el arbo. Sed li bone fartas kaj la gipsa bandaĝo ne multe baras lin. La tempo pasas kaj lia kresko bone rimarkigas nin.

En ĉi-tiu numero vi trovos plurajn artikolojn kiuj retrorigardas al diversaj tempoj. Kompreneble unue al nia somera KELI-kongreso, sed ankaŭ al aliaj eventoj kaj epokoj.

Kelkfoje venas reagoj pri artikolo aŭ enhavo, kaj pri tiuj mi multe ĝojas, sed mi devas substreki ke estas la aŭtoro de iu preciza artikolo kiu responsas pri la enhavo. Legu kaj gardu kio estas bona.

Mi deziras al vi agrablan legadon.


# Ora Et Labora!

Julia SIGMOND, RO

Mi jam eĉ ne memoras, kiam mi aŭdis la unuan fojon ĉi tiun maksimon.

Antaŭ nelonge mi decidis, ke fine mi devus serĉi ties originon. Nun alvenis la momento. Kaj jen, mi eksciis, ke tiu maksimo, diktita de Sankta Benedikto, naskiĝinta ĉirkaŭ 480, iĝis la devizo por la monaĥoj de la Benediktana Ordeno, de li fondita.

Nu, ĉio en ordo – mi pensis – tia severa normo bone taŭĝas por tiuj laŭdindaj homoj, konstante preĝantaj kaj laborantaj … sed al mi ne konvenus esti monaĥino. En mia vivo ja ne pasas tago sen laboro kaj sen preĝo. Nur dumtage mi kutimas labori, sed mi preĝas ankaŭ dum la tiel nomataj "blankaj noktoj", kiam la sonĝo evitas miajn okulojn. Pro tio mi ŝatas ĉi tiun maksimon, ĉar mi emas kaj labori kaj preĝi.




Tamen, al mi ne konvenus esti monaĥino. Tiu kara Sankta Benedikto ne permesus al mi skribi, legi, muzikon aŭskulti, aŭ promeni en la naturo, nur je mia propra plezuro, por ĝui ties belecon. Kvankam per tiuj ĉi distriĝoj neniun mi damaĝus en la Granda Universo! Eble nur pli bonhumore mi laborus kaj pli dankeme mi preĝus.

Ekzemple, hieraŭ vespere mi partoprenis preĝejan orgeno-koncerton. Mirinde estis aŭskulti kaj ĝuegi la muzikojn de Bach, Händel, Mozart. Denove mi ekmemoris la maksimon, kaj dum mi frandis la muzikon, naskiĝis en mia menso la teksto de letereto, adresota al la severa Orden-fondinto:

> "Estimata Sankta Benedikto! La maksimo "PREĜU KAJ LABORU", antaŭ pli ol 1500 jaroj naskiĝinta, estas tre bela, kaj mi klopodas – estimante ĝin – laŭ tiu devizo vivi. Sed por mi tio ne sufiĉas, aŭ eble tro severas. Laŭ mi, por ĉiutaga homo, ne eblas vivi nur preĝante kaj laborante. Estas ankaŭ necesa iom da honesta kaj dignoplena distriĝo. Pro tio mi transskribis la maksimon: por mi mem. Tiel ĝi sonas:
>
> PREĜU, LABORU KAJ DISTRIĜU!
>
> La originalo restu por tiuj, kiujn allogas la monaĥa vivo de via Ordeno.
>
> Kara Oĉjo Benedikto!
> Esperеble Vi ne koleretas al mi?!
> Via unitaria adeptino"

# KELI – kongreso

3-10 aŭgusto 2013

Temo: AKVO

Raportas Els van DIJK, NL

La ĉeĥa urbo Svitavy gastigis la partoprenantojn de la ĉi-jara KELI-kongreso. Dank' al la organizaj kapabloj de Pavel Polnický ĝi povis okazi. La bela restaŭrita urbo fariĝas pli kaj pli alloga centro por kunvenoj pro la Esperanto-muzeo kaj aktivaj tieaj samideanoj.

La koro de la renkontiĝo estis la paroĥejo de la Ĉeĥfrata eklezio evangelia. En ĝi la kunlaborado de afablaj helpantoj ebligis diversajn aferojn, ekzemple Jindra Dubinová prizorgis la trinkaĵojn kaj kukojn. Brila vetero invitis al ripozo en apuda parko. Tagaj promenadoj inter tiu preĝejo, loĝloko kaj gimnazia manĝejo zorgis por la necesa korpa moviĝo. Al malfacile irantoj servis pluraj afablaj partoprenantaj aŭtomobilistoj.

La tagoj komenciĝis kaj finiĝis per ĉiutagaj preĝoj, al kiuj kontribuis la kongresanoj. La komuna kantado invitis multajn praktikii la kantojn el ADORU. La lerta gvidado de Stefan Lepping certe instigis entuziasmulojn. Pro la frua horo kaj distancoj nur kelkaj ĝuis la jogo-ekzercojn kun Vera Tuinder. La du knaboj, la sveda André Åradsson kaj la estona Joonatan Ojasild, amikiĝis. La nederlandano Jef Tuinder spontanee ludigis ilin.

**SABATE** alvenis la plej multaj kongresanoj el 10 landoj. Post la vespermanĝo kunsidis la estraro. La aliaj alvenintoj povis ripozi post siaj longaj vojaĝoj.


Pavel Klimeš

DIMANĈE okazis la du-lingva diservo kun la loka eklezia komunumo. La pastoroj Pavel Klimeš de KELI kaj Filip Keller, la gastiganto, gvidis ĝin. La legaĵoj estis Johano 6, 25-35 kaj Jesaja 55, 1-5. La temo de la prediko devenis el la menciita teksto de Jesaja. Post la Sankta Manĝo sekvis Porpeta Preĝo. La tekstoj de la Deputo kaj Beno estis el Apokalipso 22, 16-17 kaj Nom-


Promeno en Svitavy



Promeno en Svitavy

broj 6, 24-26. Finfine restis ebleco interkonatiĝi kun la eklezianoj kiuj regalis nin per kafo kaj bongustaĵoj.



Promeno en Svitavy

Marie Minářová, membro de la Esperanto-klubo de Svitavy, gvidis posttagmezan promenadon tra la urbo. La historia centro kun la granda urba placo kaj kun arkadoj je ambaŭ flankoj kun butikoj plaĉis al ni. La esplorado finiĝis en la vilao, donacita de la svitavyano Valentin Oswald Ottendorfer (1826-1900). Post lia migrado al Usono li ne forgesis la naskiĝurbon. Tie-ĉi en la domo, kiun li donacis al la urbo, nun troviĝas ankaŭ Esperanto-muzeo. S-ino Libuše Dvořáková, prezidantino de la loka klubo kaj vic-prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio montris la ekspozicion. Alia atentaĵo troviĝas en la parko apud la kongresejo. Staras tie monumento memorante pri Oskar Schindler (Svitavy 1908 – Hildesheim 1974). Ĝi surhavas la tekston: “La neforgesebla vivsavanto de 1200 persekutitaj Judoj”. Vespere okazis la interkona vespero finiĝanta per vespera preĝo.



Vizito en la Eo-muzeo

**LUNDE** enkondukis la KELI-prezidanto, Philippe Cousson, la kongresan temon: AKVO,

Stefan Lepping prelegis pri KANTOJ, TEKSTOJ KAJ MUZIKA HISTORIO. Els van Dijk donis novajn informojn rilate EVIDENTE, la helporganizo al blindaj kaj malbonvidantaj homoj en malriĉaj landoj. La iniciato de Jacques Tuinder prosperas. Siegfried Krüger rakontis pri la akvo de sia loĝurbo Heilbronn en Germanio kaj la tago estis finita per vespera preĝo.

**MARDE** mateno estis dediĉita al lingvaj temoj. Petr Chrdle elektis temon PROFESIA UZO DE ESPERANTO KAJ ĜIAJ SPECIFAJ TRAJTOJ kaj Ed Borsboom sprite rakontis pri sia vizito ĉe la verkisto Karolo Píĉ.

La malnova urbo Polička fariĝis la celo de la duontaga ekskurso. La promenadoj al la restaŭritaj ŝtonaj fortifikaĵaj muroj kun dek naŭ turoj kaj la monumento pri Comenius, allogis ne



Stefan Lepping



Ripozo dum ekskurso

ĉiujn pro la varmego. La centro rememore al la komponisto Bohuslav Martinů troviĝas en la urba muzeo. La urbo estis fondita en 1256 kaj havas interesan historion. Kelkaj kongresanoj "grimpis" al naskiĝloĝejo de B. Martinů en la preĝeja turo.

Vespere prezentis sin kongresanoj per kantoj, ŝercoj, muziko.

**MERKREDE** ekskursis ĉiuj al Litomyšl, la naskiĝloko de la Esperanto-verkisto Karolo Píč kaj la komponisto Bedřich Smetana. Tie loka esperantisto, Petr Jonáš, gvidis nin helpeme al la vidindaĵoj. Inter alie vizito al la belega renesanc-stila kastelo kun baroka teatro fariĝis neforgesebla sperto. Laste sekvis solenaĵo ĉe la tombo de Karolo Píĉ. Ed Borsboom surmetis rozobukedon nome de ni.

**ĴAŬDE**, kiel kutime, okazis la jarkunveno. Posttagmeze prelegis Ágnes Ráckevy-Eötvös pri LA AKVO DE LA DANUBO. Bengt Olof Åradsson montris fotojn faritajn en ŝosea preĝejo de BRÖNNESTAD. Dum la someraj monatoj troviĝas plurloke en Svedio apud ŝoseoj, preĝejoj dumtage malfermitaj por preterpasantoj.

Vespere ni ĝuis en la romkatolika preĝejo publikan koncerton por enloĝantoj kaj kongresanoj de la esperantisto kantisto Miroslav Smyčka kaj la orgenisto Stefan Lepping.



Dum duontaga ekskurso en malnova lernejo



André S. Antal F. Pavel P.


Vendado de ĉinaj artaĵoj

La televido el la distrikto Pardubice, al kiu Svitavy apertenas, filmis. Vendrede okazis intervjuo kun Pavel, Bengt Olof, Ágnes kaj ilia filo André.

**VENDREDE** gvidis Philippe Cousson la kongresdiservon kaj li ankaŭ predikis. La bibliaj legaĵoj estis Jesaja 55,10-11; Apokalipso 22,1-2. Ni kolektis monon por Evidente (Zienderogen).

Al la adiaŭa vespero kontribuis multaj el inter ni per kantoj, teatraĵoj, muziko, ŝercoj. Fariĝis agrabla kunestado kun finfine la ne-evitebla adiaŭo.

**SABATE** matene restis pli malgranda grupo por la lasta kunveno kaj tagmanĝo. Ni vojaĝis hejmen kunportantaj en la koro la rememoron pri sukcesa kongreso kun novaj kaj malnovaj geamikoj.

Fotis V. Pospišil,
Á Ráczkevy-Eötvös,
K.H. Schaeffer



La kongresanoj ĉe la tombo de Karolo Píč

# Jogo dum la kongreso

Vera TUINDER-DEKKER, NL

Frumatene, je kvarono antaŭ la sepa, Jef kaj mi forlasis nian komfortan portempan loĝejon kaj enspiris la freŝan aeron.

La somero en Ĉeĥio estis vere varma, sed la mateno inspiris nin al marŝado. Laŭlonge de la gimnazio, kie ni dufoje tage manĝis, ni iris al la kongresejo . Dumvoje ni renkontis du gesamideanojn, kiuj samfrue ellitiĝis por iri al la ĝardeno de la kongresejo.

Ni faris malgrandan rondon kaj salutis per hinda saluto: na maste. Tio volas diri: mi salutas la lumon en vi.

Kiel vi intertempe komprenas, ni faris jogajn ekzercojn en plena aero sur la herbejo. Ni diligente laboris dum duona horo. Ni imagis nin, interalie, arbo, floro, heroo, lignohakistoj, muelilo kaj tiel plu. La etoso estis meditiga. Refreŝigitaj ni povis komenci la kongresajn temojn.

Ni kvarope ĝuis, dum ĉiu mateno de la kongreso, la inspirigan kunlaboron. Bedaŭrinde por la aliaj kongresanoj mankis ĉi tiu travivaĵo.

Fotis Václav Pospíšil

Pavel, nia kongresa organizanto





Vera, Karl Heinz kaj Pavel.



Vera kaj Jef

# Inkunabloj ĉe Internacia Esperanto-Instituto, IEI

## 3:a parto

Ed Borsboom, NL

La japana zamenhofologo Ito Kanzi, ankaŭ konata sub la pseŭdonimo Ludovikito, eldonis en 1979 la libron *La inkunabloj de Esperanto* en la serio *iam kompletigota verkaro de L.L.Zamenhof.*

En tiu volumo li pritraktas la esperantajn verkojn, kiuj aperis ĝis septembro 1889, tute en la spirito de Waringhien. Ito Kanzi publikigis en 1994 *Ludoviko kaj la inkunabloj*-n en la serio *ludovikologia dokumentaro.* En ĝi la japano jam ŝanĝis la difinon de inkunablo. Li notis, ke Waringhien iam proponis, ke ni nomu *inkunabloj* tiujn tekstojn, kiuj aperis antaŭ septembro 1889. Ito Kanzi aldonis, ke tiu limigo ŝajnas al li tro mallarĝa. Li daŭrigis, mia amiko Marcel Delcourt havas la opinion, ke la inkunabloj devas ampleksi pli larĝan sferon ol tiun, proponitan de Waringhien. Ito Kanzi konsentis kun la franco kaj skribis, ni metu la finan punkton [de inkunabloj] ĉe iu peco el inter la eldonaĵoj de la 19-a jarcento.

La arĥiva fako ĉe Internacia Esperanto-Instituto transprenis tiun penson kaj ni signas ĉiun aperintan presaĵon en la lingvo Esperanto antaŭ la 1-a de januaro 1900 inkunablo. En tiu kategorio cetere ne rekte apartenas faksimiloj de la originalaĵoj el 1887-1900. Nia IEI-biblioteko posedas nur unu preskaŭ disfalintan inkunablon:

n-ro 64 *Universala Vortaro de la lingvo internacia Esperanto* 2-a eldono, Varsovio, Presejo de M. Weidenfeld kaj Ignacy Kelter, 1898




Ekzistas ĉe IEI aliaj antikvaĵoj, kiel el 1900

*Ekzercaro de la lingvo Esperanto* de L. Zamenhof , 3-a eldono, Varsovio, J. Kelter

kaj la plej unua (!) lernolibro por nederlandanoj el 1901

*Internationale Taal Esperanto, spraakkunst met woordenlijst** de Joh. C. Bruijn 3-a eldono, Amsterdam, M. Lobo Mz

Tiujn broŝurojn, produktitajn inter 1900-01-01 kaj 1917-04-14, ni ĉe IEI indikas per post-inkunabloj.

* Internacia Lingvo Esperanto, gramatiko kun vortolisto

# La ges-roj Wurmbrand, modernaj geherooj de la Fido

## Malĉasta ateisto fariĝas kristana sanktulo

de Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Du el la multaj kristanaj geherooj de nia tempo estas Rikardo kaj Sabina Wurmbrand, judoj el Rumanujo. Kiam Rikardo estis juna viro, li estis tre malĉasta kaj tre drinkema. Li estis ankaŭ ateisto.

Dume, en vilaĝo en la montaro tre distance de la loĝejo de la Gesinjoroj Wurmbrand, maljuna ĉarpentisto preĝadis sekve:

"*Mia Dio, mi estas servinta Vin ĉi tie en la tero kaj mi deziras ricevi mian rekompencon ĉi tie en la tero kiel ankaŭ en la ĉielo. Mia rekompenco devas esti ke mi ne mortu antaŭ ol mi gvidu judon al Kristo, ĉar Jesuo estis el la juda popolo. Sed mi estas malriĉa, maljuna, kaj malsana. Mi ne povas ĉirkaŭiri por trovi judon. En mia vilaĝo estas neniu judo. Bonvolu sendi judon al mia vilaĝo kaj mi ege klopodos gvidi lin al Kristo.*"

Inter la 12.000 vilaĝoj de Rumanujo, Rikardo kaj Sabina elektis la vilaĝon de la maljuna ĉarpentisto kie ferii. Li ege emociiĝis kiam li eksciis ke la Gesinjoroj Wurmbrand estas judoj. La ĉarpentisto kun sia edzino pasigis horojn preĝantaj por la juda geedza paro. Ili ege ĝojis kiam Rikardo konvertiĝis al Kristo. Baldaŭ ankaŭ Sabina iĝis kristano. La vivo de Rikardo tute ŝanĝiĝis: li forlasis la drinkaĵon kaj la malĉastecon.

**La pastreco de Wurmbrand dum la Dua Mondmilito**

La Gesinjoroj Wurmbrand gvidis aliajn personojn al Kristo. Tiuj personoj sinsekve gvidis aliajn personojn al la Savanto. Baldaŭ, nova luterana preĝejanaro formiĝis kaj Rikardo iĝis ĝia pastro. Alvenis la tempo de la nazioj. Preskaŭ ĉiuj parencoj de Sabina pereis en la naziaj koncentrejoj. En Rumanujo, la protestantoj suferis persekuton egale kun la judoj. Kelkfoje, Rikardo kaj Sabina estis arestitaj, alportitaj antaŭ naziajn juĝistojn kaj batitaj. La nazia erao estis terura sed ĝi estis nur la komenco de tio kio venos poste.

Pastro Wurmbrand sentis memriproĉon pro esti ateisto antaŭe. Tial li ege deziris gvidi rusojn al Kristo. Li eĉ komencis fari tion dum la nazia tempo. En Rumanio estis miloj da rusaj militmalkaptitoj. Rikardo kaj la anoj de lia preĝejanaro vizitis ilin kaj atestis al ili pri Kristo.

Je la 23-a de aŭgusto de 1944, miliono da rusaj soldatoj invadis Rumanujon. Pastro Wurmbrand kaj liaj kristanaj gefratoj sekrete eldonis la Evangelion laŭ la Apostolo Johano kaj alian kristanan literaturon en la rusa

lingvo. Malgraŭ la granda risko, la kristanoj disdonis tiun literaturon inter la rusaj soldatoj kaj per tiuj soldatoj la kristanoj kontrabandis ĝin al Sovetunio. Ekzemple, la kristanoj sciis ke la politikaj oficiroj vojaĝis en la unuaj vagonoj de la trajnoj kaj la rusaj soldatoj vojaĝis en la malantaŭaj vagonoj. Do, la kristanoj atendis ĝis la unuaj vagonoj pasis kaj tiam ili ĵetis la literaturon tra la fenestroj de la malantaŭaj vagonoj. Rikardo kaj liaj kristanaj gefratoj ankaŭ atestis rekte al la rusaj soldatoj kaj gvidis multajn el ili al Kristo.

Kristana fratino kiu disdonis literaturon en stacioj de la fervojo donis la adreson de pastro Wurmbrand al rusa oficiro. Unu tagon nokte, la alta belaspekta leŭtenanto eniris la hejmon de la pastro. Rikardo demandis: "Kiel mi povas servi vin?" La oficiro respondis: "Mi venas por trovi lumon." La pastro komencis legi versiklojn de la Biblio pri Jesuo Kristo kaj la savo kiun Li ofertas al ĉiuj homoj. La ruso metis sian manon sur la manon de la pastro: "Mi petas vin el mia koro, ne trompu min. Mi apartenas al popolo kiu piediras en la mallumo. Diru al mi, mi petas, ĉu ĉi tio estas la vera vorto de Dio?" Wurmbrand certigis lin ke jes. La rusa oficiro aŭskultis al la pastro dum kelkaj horoj — kaj finfine li ricevis Kriston kiel sia Savanto. Multfoje, Pastro Wurmbrand havis similajn travivaĵojn.

**Wurmbrand atestas pri Kristo al la pastroj kaj al la popolo de Rumanujo**

Baldaŭ, la komunistoj prenis la potencon en Rumanujo. Post ne longe, ili kunvokis kongreson de 4.000 katolikaj, ortodoksaj kaj protestantaj pastroj en la parlamenta konstruaĵo de la lando. La 4.000 pastroj elektis la "buĉiston" Jozefo Stalin kiel sia honorinda prezidanto. Unu post la alia, tiuj pastroj leviĝis kaj laŭdis la komunismon kiel la plenumo de la kristana fido. Ili promesis fidelecon al la nova komunista registaro.

La Gesinjoroj Wurmbrand ĉeestis la kongreson. Rikardo estis alta viro de du metroj. Sabina estis malalta; ŝi apenaŭ atingis ĝis la ŝultron de Rikardo. Sed ŝi estis pakaĵo de dinamito. Tie en la kongreso kaj aŭskultanta la stultaĵojn de tiuj pastroj, Sabina ege koleris. Ŝi diris al Rikardo: "Ĉi tiuj homoj kraĉas en la vizaĝon de Kristo. Supreniru al la platformo kaj forviŝu la kraĉaĵon for de Lia vizaĝo!" Rikardo diris: "Se mi faras tion, vi perdos la edzon!" Ŝi respondis: "Mi preferas perdi la edzon ol esti edziĝinta kun malkuraĝulo!"

Per tiu "piedbato al la pantalono", Rikardo supreniris la platformon. Anstataŭ laŭdi la murdiston de la kristanoj, li laŭdis Kriston kaj li diris ke la homoj devas esti fidelaj nur al la Savanto. La paroladoj de la Kongreso estis disaŭdigitaj tra la tuta lando. Do, ĉiuj homoj en Rumanujo povis aŭskulti la mesaĝon pri Jesuo Kristo kiun pastro Wurmbrand predikis.

**La du arestoj de pastro Wurmbrand**

Sed Rikardo baldaŭ ege pagis pro sia "senhonteco". Dimanĉe, la 29an de februaro de 1948, survoje al sia preĝejo, li estis forkaptita de la sekreta polico. Dum pli ol ok jaroj, lia edzino kaj liaj

geamikoj ne sciis ĉu li vivas aŭ ĉu li estas mortinta. Sekretaj policanoj vizitis Sabina-n, pretendantaj esti ekskamaradoj de Rikardo en la malliberejo. Ili diris al ŝi ke ili ĉeestis la enterigon de ŝia edzo. Ŝi estis korrompita. Post pli ol ok jaroj, Rikardo estis liberigita kaj tuj daŭrigis sian laboron de predikado kaj evangelizado. Sed la libereco nur daŭris tri jarojn. Tiam, li estis rearestita kaj kondamnita al 25 jaroj en la malliberejo. Post kvin jaroj kaj duono, li estis liberigita dum ĝenerala amnestio.

**La suferado de pastro Wurmbrand**

Dum la 14 jaroj, kiujn pastro Wurmbrand pasigis en la komunistaj malliberejoj, li travivis kaj observis terurajn torturojn. Florescu, alia pastro, estis torturita per tranĉiloj kaj varmegaj fajrostangoj. La komunistoj devigis lin stari tage kaj nokte dum du semajnoj ĉar li rifuzis perfidi siajn kristanajn fratojn. Kristanoj estis pendigitaj inversigitaj kaj severe batitaj. Ili estis metitaj en glaciaj karceroj kaj preskaŭ frostigitaj ĝis la morto. Ĉi tiu torturo estis ripetita multfoje. Kristanoj estis metitaj en lignaj skatoloj apenaŭ pli grandaj ol la persono. Centoj da najloj estis najlitaj en la flankoj de la skatolo. Dum la senfinaj horoj kiam la viktimo estis tie, li devis esti komplete kvieta. Kiam li laciĝis kaj iomete moviĝis, la najloj tratruis la karnon.

Kristanoj estis ligitaj al krucoj dum kvar tagoj kaj noktoj. Tiam la krucoj estis metitaj sur la plankon kaj centoj da malliberuloj estis devigitaj elĵeti ekskrementon sur la vizaĝojn kaj la korpojn de la krucumitoj. Tiam la krucoj estis levitaj kaj la komunistoj mokis: "Rigardu vian Kriston! Kiel bela Li estas! Kian parfumon Li alportas el la ĉielo!" Pastro Wurmbrand suferis tiajn torturojn kaj li ofte estis batita. Plue, la komunistoj tranĉis kaj bruligis 18 (dek ok) truojn en lia korpo.

**La suferado de Sabina kaj Mihai**

Sabina estis ankaŭ arestita kaj ŝi pasigis tri jarojn en koncentrejo. Ŝi kaj la aliaj malliberulinoj laboris konstruantaj kanalon proksime de la rivero Danubo. Sabina kaj aliaj virinoj suferis seksatencon de la kruelaj gardistoj. La virinoj ŝovelis kaj portis teron eĉ dum la vintro. Ili havis la saman laborŝarĝon kiel la viroj. Prostituitinoj regis la kristanajn malliberulinojn; ili insultis kaj batis la kristanajn virinojn. Dimanĉe, la gardistoj ĝoje ĵetis la malliberulinojn en la Danubon. Ili elĵetis la virinojn el la rivero kaj ĵetis ilin denove.

Mihai, la filo de la gesinjoroj Wurmbrand, havis naŭ jarojn kiam liaj gepatroj estis forprenitaj. Li estis forlasita kaj devis vaki tra la stratojn. Ĉe la komunistoj, estis krimo helpi la gefilojn de la "malamikoj de la popolo". Du virinoj kiuj helpis al Mihai estis arestitaj kaj severe batitaj; tiel ili restis kriplaj. Alia virino kiu akceptis Mihai en sian hejmon, estis kondamnita al ok jaroj en la malliberejo pro tiu "krimo". La dentoj de tiu virino estis piedbatitaj eksteren kaj ŝiaj ostoj estis rompitaj. Ŝi ne plu povis labori; ŝi ankaŭ restis kripla dum la tuta vivo.

**La liberigo de pastro Wurmbrand**

Kiam pastro Wurmbrand estis liberigita dum la ĝenerala amnestio de 1964, li daŭrigis sian sekretan pastrecon. Kristanoj en Norvegujo eksciis ke la pastro estis en granda danĝero esti arestita denove kaj tiel li certe pereus en la malliberejo. Je tiu tempo, la komunista registaro de Rumanujo komencis "vendi" siajn politikajn skismulojn al okcidentaj landoj. La normala prezo estis $1.900 po persono. La kristanoj en Norvegujo intertraktis kun la komunistoj por "aĉeti" Wurmbrandon kaj lian familion. La komunistoj postulis kaj ricevis $10.000 por la pastro!

Antaŭ ol Pastro Wurmbrand eliris kun sia familio el sia lando, la komunistoj minacis lin: "Vi devas bone konduti tie en la Okcidento! Se ne, ni havas la rimedojn mortigi vin aŭ forkapti vin kaj alporti vin ĉi tien denove." La pastro ne atentis ilin. Li sentime aperis antaŭ komitato de la Usona Senato por atesti pri la kruelegaĵoj de la komunistoj. Li forprenis la ĉemizon por montri la cikatrojn de la torturoj. La atesto de Pastro Wurmbrand estis disaŭdigita tra la tuta mondo. La komunistoj tre hontiĝis kaj ne aŭdacis fari ion kontraŭ la sentima pastro kaj lia familio. Poste, Wurmbrand vojaĝis al urbego Berkley en la ŝtato Kalifornio kie junaj maldekstruloj faris manifestadon por "libera" (fia) parolo. Tie, li supreniris al la platformo kaj denove li forprenis la ĉemizon por montri la torturajn cikatrojn. La komunistaj simpatiantoj hontiĝis kaj silentis.

**La pastreco de Wurmbrand en la okcidento**

Pastro Wurmbrand fondis organizaĵon kun nomo "Kristo al la Komunista Mondo". Tiu organizaĵo publikigis la krimojn de la komunistoj kontraŭ la kristanoj kaj ĝi sendis helpon al iliaj viktimoj kaj la familioj de la viktimoj. Kiam la komunismo kolapsis je la jaro 1989, la organizaĵo "Kristo al la Komunista Mondo" ŝanĝis sian nomon al "Voĉo de la Martiroj".

Nuntempe, Voĉo de la Martiroj ne nur publikigas la persekutojn de la komunistoj en Kubo, Norda Koreio, Ĉinio kaj Vjetnamio, sed ĝi ankaŭ publikigas la persekutojn kontraŭ kristanoj de la hinduoj en Hindujo, de la islamanoj en Afriko, Pakistano, Bangladeŝo, kaj Indonezio. Tiu organizaĵo sendas monhelpon al la familioj de kristanaj pastroj kiuj estas en malliberejoj; ĝi ankaŭ sendas monhelpon, nutraĵon, kaj laborilojn al kristanoj kiuj perdas siajn hejmojn kaj posedaĵojn. Alia grava helpo kiun la "Voĉo" provizas, estas la helpo de kuracistoj kaj medikamentoj por la kristanaj viktimoj kiuj suferas vundojn pro atakoj. (Vi povas informiĝi plu pri Voĉo de la Martiroj per viziti ĝian interretan lokon: persecution.com .)

Rikardo Wurmbrand forpasis la 17-an de februaro de 2001, kun aĝo de 91 jaroj. Sabina mortis la 11-an de aŭgusto de 2000, kun aĝo de 87 jaroj. Sed la beno kaj la inspiro de iliaj vivoj daŭras ĝis nun.

# Prediko en Svitavy, 9an de aŭgusto 2013

Philippe Cousson, FR

**Jes 55, 1 k. 10 - 11**
1 Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo, kaj vi, kiuj ne havas monon; iru, aĉetu, kaj manĝu; iru, aĉetu sen mono kaj sen pago vinon kaj lakton.
...
10 Ĉar kiel la pluvo kaj la neĝo falas de la ĉielo kaj ne revenas tien, sed malsoifigas la teron kaj naskigas kaj produktigas ĝin kaj donas semon al la semanto kaj panon al la manĝanto:
11 tiel estos Mia vorto, kiu eliras el Mia buŝo; ĝi ne revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis.

**Apo 22, 1-2 k. 17**
1 Kaj li montris al mi riveron de akvo de vivo, helan kiel kristalo, elirantan el la trono de Dio kaj de la Ŝafido, 2 meze de ĝia strato. Kaj ĉe ĉiu flanko de la rivero estis arbo de vivo, portanta dek du fruktojn, liveranta sian frukton ĉiumonate; kaj la folioj de la arbo estis por la resanigo de la nacioj.
...
17 Kaj la Spirito kaj la fianĉino diras:Venu. Kaj la aŭdanto diru:Venu. Kaj la soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace la akvon de vivo.

Karaj gefratoj en Kristo, kiam mi rigardis la paperon, kiun preparis Pavel Klimeŝ, kiam mi komencis aŭskulti lian predikon, mi pensis: jen li prenis miajn tekstojn, kaj mi devos trovi aliajn. Sed post pripenso, mi pensis ke kun tiuj tekstoj multon eblas diri.

Mi ne refaros la enkondukajn klarigojn kiujn li faris.

El ĉi tiuj kelkaj versikloj oni povas eltiri kelkajn ĉeftemojn: komence mi elstarigis du, soifo kaj senpageco.

Dum ĉi tiu semajno vi havis la okazon enkapigi kiel valora, ĉefa, esenca estas la akvo por la vivo. Sen akvo, ne plu da vivo. Sen akvo, nur sekeco kaj dezerto. Kaj tio validas ankaŭ por la spirita vivo.

En nia mondo, la homojn atingas

multaj soifoj. Tiuj soifoj signifas avidecon, ne eblan satiĝon. La homoj, sed ĉu ĉi tio estas nova?, deziregas tion, kion ili ne havas sed vidas, pri kio ili aŭdis. Tia soifo estas ne estingebla. Sed, ili indikas aferojn, kiuj tute ne estas bezonoj.

Multe pli vera kaj profunda spirita vivo estas montrita en la 5a ĉapitro de Mateo, kiam Jesuo deklaras: *"Feliĉaj estas tiuj kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos"*. Inverse al avideco tiu ĉi soifo al justeco kondukas al divido, al donaco. Anstataŭ konsideri nur nin mem, ĝi puŝas nin al konsidero de la alia. Anstataŭ rigardi la posedaĵojn, la objektojn, ĝi tiras nin al la rigardo de la homo, de la najbaro, de la proksimulo. Anstataŭ konduki nin en la vojon de senvivaj objektoj, ĝi kondukas nin al la akvo de vivo.

Mi eble revenos al tiu akvo de vivo aŭ viva akvo, sed mi ne rekomentos la renkonton inter Jesuo kaj la Samarianino.

Soifo do estis tiu unua grava punkto. La dua estas la senpageco. Vi prenu donace, vi aĉetu sen mono, sen pago.

En nia konsuma societo, la ago per kiu oni ekzistas estas la aĉetado, kaj por aĉeti, oni nepre bezonas monon. Mi ne estas tiel sperta en la kono de la neolitika societo antaŭ la mono. Sed oni povis dum la lastaj jardekoj konstati ke kiam estas problemo kun la mono, la tuta sistemo proksimiĝas al kolapso.

Kaj tio ankaŭ signifas: ve al la malriĉulo, al la senhavulo, al tiu kiu ne povas pagi. Tiu kiu ne havas, ne trovas sian lokon en tiu mona societo, estas kvazaŭ nenio, sentas sin nenio.


Tiun sistemon komplete senarmigas tiuj versikloj.

Eĉ krome, ĝi puŝas en alian direkton. La simpla bezono estus akvo pro soifo. Ĉu la diro ne estas ke nur akvo kapablas malsoifigi. Sed la versiklo de Jesaja aldonas vinon kaj lakton. Akvo ja estas donacita, sed la profeto aldonas kromdonacojn. Ĉar la profeto scias ke la esenca bezono kaŝas aliajn bezonojn, pri kiuj eble la homoj ne sentas la gravecon.

Kaj tiuj tute ne estas la deziroj kiujn la homoj pensas bezonoj, sed kiuj simple estas trompoj kaj pri kiuj ne eblas satiĝi.

La profeto daŭrigas per tiu klarigo. La akvo kiu senpage falas sur la teron kaj kiu vivigas plantojn, bestojn kaj homojn similas al la Vorto de Dio en siaj efikoj. Kaj, kiuj estas tiuj efikoj?

Ĝi donas panon al la manĝanto kaj semon al la semanto. Tio estas: ĝi



provizas por la nuno kaj por la estonto. Sed ankaŭ notu, ke ĝi provizas tion al la aganto, ne al tiu kiu ne agas.

Eĉ pli, ĝi donas ne nur por pluvivi, sed ankaŭ kaj ĉefe por plu doni, por pluprodukti. Al la Samarianino estis dirite: kaj tiu kiu trinkas la vivan akvon fariĝos mem fonto de akvo.

Pri tiu Vorto de Dio kiu "falas" de la ĉielo kaj akvumas la teron, kiu malsoifigas kaj naskas, oni povas pensi ankaŭ pri la rivero de la lasta ĉapitro de la Biblio. Tiu rivero, hela kiel kristalo kiu eliras el trono de Dio kaj de la Ŝafido, preskaŭ plenigas la tutan novan urbon. Ĝi akvumas la arbon de vivo, kiu kapablas nutri kaj resanigi, resanigi la naciojn.

Kompreneble, ni estas invitataj preni el tiu ĉi akvo kaj trinki, ricevi senpage la vivon, la veran vivon. Sed ne nur tio, ... ni estas invitataj fariĝi mem fonto de tiu akvo.

La akvo kiu venas de Dio, ĉu ĝi venas el la ĉielo, ĉu ĝi venas el la rivero, el la trono, portas vivon, resanigon, semon kaj panon.

Kio en tio estas nia parto? Kompreneble, ni estas invitataj preni el tiu ĉi akvo kaj trinki, ricevi senpage la vivon, la veran vivon. Sed ne nur tio, ĉar, se ni bone memoras, ni estas invitataj fariĝi mem fonto de tiu akvo. Jesuo promesis tion al tiu kiu trinkas el la vivakvo.

Franclingva kristana kantisto diras en unu el siaj kantoj: *"se mi retenas la pluvon, tiam la dezerto antaŭeniras"*.

Se mi, kiu trinkis el tiu vivakvo retenas ĝin por mi mem, mi malpermesas al la vivo atingi aliajn.

Se mi, kiu ricevis la Vorton de Dio, konservas ĝin en mia menso, mi malhelpas aliajn aliri al ĝi, aŭdi ĝin.

Se mi, kiu ricevis la panon de la savo stokas ĝin por mi mem, mi malpermesas al aliaj nutri sian animon per ĝi.

Se mi, kiu ricevis la semon de la espero akumulas ĝin en turoj, mi malpermesas al aliaj ricevi ĝin kaj kreski kaj produkti frukton.

Kompreneble tiuj tekstoj diras ke la ricevita savo estas senpaga, ke la sencon de sia vivo oni ne povas aĉeti. Ili ankaŭ parolas pri la efiko de tiu savo, de la vorto de Dio, de la vivakvo kiu estas Jesuo. Ili parolas pri la trezoroj de la vivo de Dio, pri la fruktoj de la arbo, pri la resanigo provizita de ĝiaj folioj.

Sed oni devas ankaŭ kompreni kion ili implicas por ni. Se Dio estas la donacanto, ni ricevis rolon. Ni estas la atestantoj de tiu ĉi vivo, la atestantoj kaj la portantoj, la portantoj kaj la disdonantoj, ni ĉiuj unuope, unuope kaj komune. Ĉu ni volas ke la Vorto de Dio, ke la akvo de vivo reiru al Dio sen efiko, plenuminte nenion, tute vane.

Ni ricevis donace, ni transdonu donace.

Amen.

# La bizanca Atlantido

Nicolae MACOVEI, RO

Estimata sinjoro Redaktoro, mi proponas al vi publikigi en la revuo DIA REGNO raporton pri mia eltrovado pri la kristanisma vivo en la unua miljaro, en mia regiono Suceava, Rumanio. Mi atendas vian energian konkludon.

Nicolae Macovei, esploristo
castelania@gmail.com

En mia hejmvilaĝo, *Benia*, mi eltrovis pasintsomere la ŝtonblokojn de la kvar civitoj, ĉie surskribitaj. Ili atestas pri la bizanca kristana organizado en la nordorienta parto de Rumanio, dum la unua miljaro, nomita "tenebra" ankaŭ en la internacia kristanisma studaro. Dume, mi sola elĉifrigas ilin.

La popolo de ĉi regiono estis kristanigita de Jerusalemaj kaj bizancaj misiistoj. La popolo konsistis el dakoj, Palestinaj pelasgoj, keltoj. La mitropolejo *Mel Mal* (Suverena Monto, Blanka Monto) estis organizita en episkopejoj *ruma*, en urboj-civitoj laŭ la modelo de Jerusalemo kun egiptaj, fenicaj, persaj elementoj. La "palacoj" estis rememoroj de la pelasgaj, kretaj palacoj – komunumoj. La patrina lingvo, la pelasga, estis riĉigita per vortoj similaj al keltaj, arameaj, hebreaj, grekaj, latinaj, akadaj, arabaj, fenicaj, persaj vortoj. La parenceco al la vaska, etruska, tuarega lingvoj devenas el la aparteno de ĉi lingvoj al la prehindeŭropa (mediteranea) familio. Mi nomas ĉi lingvon, *novpelasgan*. La Dakoj (indiĝena gento), uzis pelasgan lingvaĵon interplektitan kun la kelta. La skribmaniero entenas latinajn literojn kaj ian bizancan labirintan formon el 23 krucvariaĵoj kaj labirint*eroj*. La palestina homgrupo ZUS/SUZ, nuntempe nomiĝas *huţul*. La plej ofta bestsimbolo, la *foko*, proksimigas ĉi kristanan civilizon al la "atlantida" historio. La ĉefa Kruco, la *tridenta* kruco, kiel La Kruco de la Sankta Triunuo, estas alia "atlantida" spuro. Ĉu la misiistoj celis "planti" Bizancan Atlantidon?




Mi atendas vian energian reagon, konkludon.

Nicolae MACOVEI, esploristo

# La Remonstrantoj

Gerrit BERVELING, NL

Karaj geamikoj, foje mi ricevas demandon, ĉu eblas klarigi kio estas Remonstrantoj (la oficiala nomo de nia eklezio estas Remonstranta Frataro). Ĵus nia tutlanda "jarkunveno" akceptis la aldonitan tekston kiel oficialan "Mission statement" (priskribo de celado kaj identeco).

**Antaŭparolo**

Ĉe la remonstranta partoprenado en la internacia ekumeno montriĝis, ke iom pli detala vortigo de centraj valoroj kaj konvinkoj de la Remonstranta Frataro estas senchave grava.

Tiu ĉi deklaro provas montri, pro kiu vizio la remonstrantoj volas esti eklezio meze de la ceteraj eklezioj, religioj kaj la socio ĝenerale. Ĝi direktas sin al siaj partneroj en- kaj eksterlande kaj al individuaj interesiĝantoj.

## REMONSTRANTOJ: POZICIO KAJ DEIRPUNKTOJ

### LA REMONSTRANTOJ

En la bunteco de Kristanismo la Remonstranta Frataro havas propran lokon.

Remonstrantoj konsistigas protestantan eklezion, kiun karakterizas ĝia principo de libereco kaj toleremo. Ili deiras de absoluta egaleco de la homoj kaj defendas la samajn rajtojn por la homoj sendepende de iliaj sekso, seksa orientiĝo, etna deveno, enspezoj aŭ politika konvinko.

Remonstrantoj kontribuas al la novigo de eklezio kaj teologio.

Tiel en 1915 kiel unu inter la unuaj eklezioj ili akceptis virinojn kiel ordinitajn pastorojn kaj en 1948 ili aktive kunlaboris ĉe la fondado de la Mondkonsilio de Eklezioj. En 1986 ili estis la unua kristana eklezio, kiu malfermis la eblon de la nupto-promeso ankaŭ por paroj de la sama sekso. En 2006 aperis nova kredkonfeso.

Remonstrantoj volas resti en daŭra kontakto kun la evoluoj en scienco kaj kulturo.

### FIDO

**Kredkonfeso kaj principodeklaro**

Remonstrantojn unuigas la principodeklaro: *La Remonstranta Frataro estas kred-komunumo kiu, radikiĝante en la evangelio de Jesuo Kristo kaj fidela al sia principo de libereco kaj toleremo, volas adori kaj servi Dion.*

Remonstrantoj emfazas la religian liberecon. Kiu volas fariĝi membro, tiu subskribas la principdeklaron kaj estas invitata mem verki sian personan kredkonfeson. Ekzistas ankaŭ la eblo fariĝi amiko.

En 2006 estis akceptita kredkonfeso, kiu estas grava inspiro por la kredkomunumo kaj por ĉies persona fido, sed kiu ne havas devigan karakteron.

**La biblio**

Por remonstrantoj la biblio estas speciala kaj inspira kolekto da atestaĵoj, rakontoj, historioj, profetaĵoj kaj kantoj. Ili formas atestaĵon de homoj, kiuj spertis la ĉeeston kaj la mal-ĉeeston de Dio en sia propra vivo kaj en la mondo. La bibliaj tekstoj ankaŭ en la nuna tempo povas ankoraŭ konduki homojn al ligiteco kaj interrilato kun Dio.

Krom tio ankaŭ poezio, arto, muziko kaj la naturo, same kiel la skriboj de aliaj religiaj tradicioj povas esti inspirofonto.

**Bapto kaj manĝo de pano kaj vino**

Remonstrantoj konas la liturgiajn ceremoniojn de bapto kaj celebrado de la manĝo de pano kaj vino. Ili prefere parolas pri *ceremonioj* ol pri sakramentoj.

Same infanoj kiel adoltoj povas ricevi la bapton. Per la bapto la baptato fariĝas membro de la ĝenerala eklezio de Kristo. Se infano estas baptata, la bapto okazas 'en la espero, ke la infano, fariĝinte adolta, siatempe povos jesi la bapton'.

Per la bapto la baptato ne fariĝas membro de la Remonstranta Frataro. Bapto ankaŭ ne estas kondiĉo por tiu membreco.

Remonstrantoj celebras la manĝon de pano kaj vino en ligiteco kun ĉiuj, kiuj sin konsideras aparteni al la eklezio de Kristo. Estas praa remonstranta kutimo, ke la celebrado de la manĝo ĉiam estas malferma por ĉiuj 'en kiuj estas sincera deziro vivi kun Kristo'.

**Loko meze de la ceteraj eklezioj kaj religioj**

Remonstrantoj prefere kunlaboras kun aliaj eklezioj kaj vivkonceptaj organizaĵoj. Ĉe tiu ekumena strebado la moto 'Unueco en la necesa, libereco en la ne-necesa, la amo en ĉio' estas gvidlinio. La serĉata unueco estas unueco, kiu lasas spacon por diverseco.

La Remonstranta Frataro estas membro de la Konsilio de Eklezioj en Nederlando kaj estas reprezentata ankaŭ en diversaj naciaj kaj internaciaj intereklezaj kaj vivkonceptaj rilatoj. Remonstrantoj rekonas, ke homoj ankaŭ ekde aliaj kulturoj povas honori kaj servi Dion en maniero por ili konvena.

Serĉi la dialogon kun aliaj religioj kaj vivkonceptoj ili vidas kiel inspiran taskon.

**Rilato al la mondo**

Pro la evangelio remonstrantoj sin sentas alvokataj fariĝi kunlaborantoj pri mondo de paco, justeco kaj ŝirmateco de la kreo. Ili provas kiel kred-komunumo kaj ankaŭ individue aktive kontribui ĉe tio.

# Brönnestad – somera vojkirko

Bengt Olof Åradsson, SE



Ekde pasintjare, kiam ni aĉetis aŭton, ni havas pli da ebleco veturi en la ĉirkaŭaĵo kaj konatiĝi kun historiaj kaj kulturaj interesaĵoj.

Somere mi vizitis inter alie kelkajn proksimajn vojkirkojn. Tiu kiu plej multe interesis min estas Brönnestad, situata ĉirkaŭ 70 km norde de Malmö en suda Svedio. Vojkirko aŭ somera kirko estas agado dum kelkaj semajnoj de la lokaj eklezioj. La preĝejoj estas malfermitaj dumtage por preterpasantaj interesiĝantoj. Volontuloj klarigas iom pri la historio, regalas kafon kaj iam dumtage ankaŭ gvidas momenton de biblia pritraktado aŭ muziko. Kiam mi havas la eblecon mi kaptas tiujn por viziti apudajn vojkirkojn.

La preĝejo en Brönnesad estas plejparte konata pro la freskoj pentritaj sur la volboj. La pentraĵojn oni kovris dum la 17a jc per blanka kolora tavolo. Do dum pluraj jarcentoj ili ne estis videblaj, eble eĉ forgesitaj. En 1935 dum esplora laboro oni trovis ilin sed tamen daŭris ĝis 1980-81 por ke ili finfine estu videblaj denove.

Vere interesaj kaj unikaj bildoj. La plej fama pentraĵo montras Jesuon dum lia infanaĝo kiam li lernas piediri helpe de rulanta tenilo "promenhelpilo". Je mia surprizo mi komprenis ke tiu bildo montras la tempon de la pentristo, do la 15a jc! Ŝajne tiuj helpiloj ne estas moderna invento.

La unuajn partojn de la preĝejo, laŭ spertuloj, oni konstruis je la fino de la 12a jc. La unua konstruaĵo estis simpla kaj dum la sekvantaj jarcentoj oni pligrandigis kaj rekonstruis ĝin. Oni ankaŭ supozas ke je la komenco la preĝejo havis simplan horizontalan



La preĝejo je la fino de la 18a jc.



3-dimensia altara bildo



Volbaj freskoj



La lasta manĝo, kun Judaso

plafonon. Dum la 15a jarcento, post longa tempo senmilita kaj sekva prospero, la komunumoj havis eblecon grandigi kaj beligi siajn preĝejojn. Same en Brönnestad. Oni konstruis volbojn kaj invitis artistojn, kiuj pentris ilin.

La preĝejo estas konsekrita al Sta Maria, la virgulino kaj la freskoj havas tri temojn. La ĝojoj de Maria, la afliktoj aŭ doloroj de ŝi (la suferoj de Kristo) kaj Maria inter la gesanktuloj.

La artisto estas nekonata, la stilo unika, kiun oni ne rekonas ĉe aliaj regionaj preĝejoj. El la vestaĵoj de la soldatoj kaj aliaj trajtoj de la bildoj, la spertuloj konkludas, ke la artisto(j) venas el Germanio.




Jesuo praktikas marŝi kun rada apogilo

Dum la mezepoko la preĝejo havis du enirejojn, unu plejparte por la virinoj kaj la alia por la viroj. Tiun kutimon oni jam longe forlasis kaj nun troviĝas nur unu komuna enirejo.

La antaŭa altara bildo de 1766 estas iom ŝerca, ĉar la bildo etendas la kalikon el la bildo.

Fotis Ágnes Ráczkevy-Eötvös



Soldatoj serĉis novnaskitajn bebojn

# Informetoj

## Salutoj el USONO



Mi aldonas ĉi-kune foton de nia eta Esperanto-renkontiĝo pasintan sabaton ĉi-tie en Milvokio. Ili okazas ege malofte (preskaŭ neniam, fakte). KELI-ano Pierre Ullman staras maldekstre de mi kaj nia bela granda lago videblas en la fono. Venis E-istoj el najbaraj urboj (Chicago, Madison, Janesville). Pierre kaj mi estis la solaj de Milwaukee.

Mi esperas, ke vi ĝuas la someron. Kiel ĉiam, amikece salutas vin,

Jerry



## Hieronymus Stroinski

Karaj samideanoj,
mi estas funebranta pri Hieronymus Stroinski el Leizpig, longjara UEA/GEJ-membro, kiu mortis je 9a de Septembro 2013 post malfacila koroperacio en malsanulejo. Tiun mesaĝon mi ricevis de lia edzino Monika Stroinski.

Lasta Esperanto-evento de Hieronymus estis la SAT-kongreso en Madrido en aŭgusto 2013

Mi lastfoje renkontis Hieronymus vivanta kadre de 7a SES en MARTIN/Slovakio ĉi somere. Unua renkontiĝo kun Hieronymus estis en 1994 kadre de MEJS en Triberg.

Kun funebraj salutoj
Janek

# Ekumena diservo dum UK en Rejkjaviko

Jen kelkaj fotoj de la katedralo (Domkirkjan) kie je la 21-a de julio okazis la Ekumena Diservo dum la UK en Rejkjavik. Gvidis la Diservon Bernhard Eichkorn. Gerrit Berveling kungvidis la Diservon. Li ankaŭ meditis kun vortoj el la liturgio. Bedaŭrinde mankis ia kantado en la liturgio. Karl Heinz Schaeffer kaj Sieglinde Stamm prizorgis bibliajn legadojn. Ĉe-estis ĉirkaŭ 60 partoprenantoj.

Kore,
Benata Hengsmengel-Koopmans
(Fotoj ekstere kaj interne de la preĝejo kaj teksto)

Kiel kutime dum UK, ankaŭ ĉi-jare okazis faka kunsido. Fotis K.H. Schaeffer





Domkirkjan




Bernhard Eichkorn



Partoprenantoj

Vojon ekiru
LA MOND-KARAVANO
(originale verkita)




2. Urĝas tra montoj, en
valoj, kuraĝo kaj rido.
Lingvo komuna vin
ligas, fratec', forta fido.
En ĉies man' / glaso
plenplena kaj pan':
Vi nur disdonu, homido.

3. Ĉerpu esperon el spert'
kaj inspiraj rakontoj.
Vin bonvenigas hejmlan-
do; jam freŝas la fontoj.
Do man' en man' / marŝu
la mond-karavan':
Ravos vin verd', horizontoj

4. Dion kun homoj en paca
pilgrimo adoru.
Ankaŭ dum ploras l' animo,
kantante Lin gloru.
Sub Lia man' / mildas eĉ
morto, malsan':
Venu, ho Regno, aŭroru.

VOJON EKIRU • LA MOND-KARAVANO • M (Lobe den Herren = Praxis pietatis): 17a jc., religie: Stralsund 1665, Halle 1741 • GL 258, nGL 392 • EG 316, 317 • KG 524 • RG 242 • EM 82 • LH 60 • E (originale verkita): Jacques Tuinder 2000-11-05.

Pri ĉi forgesita kanto atentigis Siegfried Krüger 2013-07-25. La subtitolon La Mond-karavano aldonis Albrecht Kronenberger 2013-07-31 pretigante tiun ĉi kantfolion por la 63a KELI-Kongreso en Svitavy, Ĉeĥio (3a ĝis 10a de aŭgusto 2013).